

revuo

esperanto

januaro 1967

60-a jaro

n-ro 734 (1)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



elektrona tradukado: p. 2

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 1 Nova jaro - novaj perspektivoj (Lapenna)
- 2 Aŭtomata tradukado (Schlüter)
- 6 CED: Plia akriĝo de la lingva problemo
- 8 UNESTENO: Universala Esperanta Stenografio
- 9 Mallongaj novaĵoj
52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
- 10 Nekrologoj Laufen, Nicolaŭ, Pragano, Strauch, Vermuyten, de Vries
- 11 Esperanto en radio
La subskribo-kampanjo
- 12 La Juna Vivo
- 13 Oficiala informilo n-ro 397:
Elekto de komitatanoj B; Faciligo de fervoj-rabatoj; La internaciaj konkursoj 1966
- 14 Anoncetoj

kovrila bildo

La centra regilo de universala komputilo IBM/360 modelo 30 en esploro en Germanujo. Vidu pri aŭtomata tradukado p. 2. (Foto: IBM)

bildojn liveris

- 3 (kaj 4) IBM

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
januaro 1967

En la studo "La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj", verkita en 1962 kaj publikigita poste kiel dokumento de CED A/II/1, mi klopodis koncize analizi la situacion sur la lingva kampo. La lingva problemo estis pritraktita laŭ kvin ĉefaj aspektoj: teknike-lingva, socia, psikologia, ekonomia kaj politika. La analizo montris, ke la nombro de naciaj lingvoj uzataj en internaciaj rilatoj, "anstataŭ malkreski, kiel neinformitaj personoj ofte supozas, multiĝas de jaro al jaro kaj kreas senfinajn komplikaĵojn". Estis ankaŭ akcentite, ke la enkonduko de la t.n. "laboraj lingvoj" ne nur ne solvis la problemon sed eĉ aldonis novajn komplikaĵojn, ĉar la lukto inter la lingvoj vastiĝis: "ĝi restis akra sur la kampo de oficialaj lingvoj kaj nun etendiĝas ankaŭ al tiu de laborlingvoj". Surbaze de nur kelkaj disponeblaj informoj, la kostoj de multlingveco estis taksitaj je "kelkaj centoj da milionoj da dolaroj jare".

La informoj, kiujn ni publikigas en tiu ĉi numero en la rubriko de CED, ne nur konfirmas la ĝustecon de la analizo kaj antaŭvidoj, sed eĉ vaste transpasas la takson de la ekonomia ŝarĝo kaŭzita de multlingveco.

Lingva batalo ĉe UN kaj Unesko

La Ĝenerala Asembleo de U.N. en New York kaj la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, ambaŭ okazintaj fine de 1966, estis denove scenejoj de lingva batalo.

En New York la reprezentantoj de france parolantaj nacioj kaj kolektive kaj individue en siaj paroladoj postulis "ne privilegion aŭ favoron" (*sic!*), sed nur "justecon" kaj reestablon de "ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de la franca lingvo", kiun oni abunde laŭdis kiel "valoregan instrumenton de civilizo". Prave. Sed ĉu la aliaj lingvoj — ne nur la t.n. "grandaj", sed ĉiuj aliaj — ne estas egale gravaj instrumentoj de civilizo? Se ne, do kio ili estas? Unu delegito eĉ menciis "intrigojn kaj diskriminacion" rilate la francan. Respondeca persono certe ne faros tiajn asertojn senbaze. Do, verŝajne li pravis. Sed kio pri la hispana, same laborlingvo de U.N.? Kio pri la ĉina kaj rusa, la du pliaj oficialaj lingvoj? Kio pri ĉiuj aliaj lingvoj, kiuj estas insulte traktataj kiel triarangaj? Oni aŭdis, ke adekvata uzado de la franca lingvo ebligis "al la france parolantaj delegacioj doni sian gravan kontribuon al la idealoj, kiuj estas formulitaj en la Ĉarto". Konsentite. Sed ĉu tio ne implicas rekonon de la senduba fakto, ke oni povas efike esprimi sin nur en mastrata lingvo? Ĉu tio ne signifas samtempe rekoni, ke ĉiuj aliaj delegacioj, kies lingvoj ne estas "laboraj", estas senigitaj de la ebleco sukcese kontribui al la verko de U.N.?

Efektive, diskriminacio ekzistas, kaj ĝi fariĝas ĉiam pli sentebla, sed ne en la senco pre-

zentita de la france parolantaj delegacioj. La koncepto mem de "oficialaj" kaj "laboraj" lingvoj, al kiuj, cetere, apartenas ankaŭ la franca, signifas gravegan diskriminacion rilate la naciojn, kies lingvoj ne ĝuas tian privilegian pozicion. Tion oni komencas kompreni eĉ en kelkaj medioj de U.N. kaj de Unesko.

Tre instrua estas la lukto ĉirkaŭ la araba lingvo en la lasta Ĝenerala Konferenco de Unesko, kie oni longe pridiskutis la proponon de arabaj landoj, ke ankaŭ ilia lingvo fariĝu "labora". Sub glazuro de formala ĝentileco la debato fakte estis drameca. Altspiritaĵoj argumentoj pri kulturaj valoroj kaj historiaj misioj intermiksiĝis kun pli ordinaraĵoj monaj demandoj. Post longaj diskutoj kaj eĉ privata renkontiĝo inter la usona kaj la 13 arabaj delegacioj, oni fine akceptis por la estonteco ankaŭ la araban kiel laborlingvon. Notinda estas la propono de la delegito de Germanujo (okcidenta) rilate la plivastigon de la pozicio de laborlingvo al "aliaj same gravaj lingvoj". Ĉi-foje ĝin apogis nur 10 aliaj delegacioj kaj la propono provizore malsukcesis. Morgaŭ ĝin subtenos pliaj ŝtatoj. La lukto certe ne finiĝis.

Aliflanke, la publikigitaj dokumentoj malkovras kelkajn detalojn pri la timigaj kostoj de tradukado kaj interpretado. Eĉ por personoj, kiuj atente sekvas tiun aspekton de la lingva problemo, ili estas ŝokaj. Pripensu iomete: 15 000 dolaroj por la nuraj traduko kaj kunligitaj kostoj de 200-paĝa multobligita dokumento en 4 lingvoj! UEA elspezas tiom por la tuta monda informado pri Esperanto, inkluzive la elspezojn de CED, dum proksimume 5 jaroj! Notu plue: preskaŭ 500 000 dolaroj nur por la tradukado de dokumentoj por unu sola sesio de unu sola organo de U.N.; preskaŭ 300 000 dolaroj por tradukado kaj interpretado de ununura faka konferenco! La kapo turniĝas pro tiuj ciferoj. Ili ricevas astronomiajn dimensiojn, se oni prenas en konsideron ĉiujn nuntempajn internaciajn kunvenojn, la elspezojn de unuopaj delegacioj, la kostojn en komerco kaj turismo, la elspezojn por lingvolernado, la milionajn sumojn por la propagando de la grandaj lingvoj.....

Ne nur gravega diskriminacio, sed ankaŭ diskriminacio detruie multekosta. La esperoj, siatempe ligitaj al aŭtomata tradukado, fine montriĝis naivaj revoj kaj kostis pliajn milionojn.

La plua konsiderinda akriĝo de la lingva problemo malfermas novajn perspektivojn, ĉar ĝi necese puŝas la homaron al la sole racia solvo en la senco de la Propono prezentita al U.N. la 6-an de oktobro 1966. Ankaŭ kelkaj ŝtatoj jam konsciiĝas pri tio, kiel evidentiĝas la oficiala iniciato de 5 skandinaviaj landoj ĉe Unesko.

(daŭrigo sur p. 8)

esperanto
januaro 1967

Aŭtomata tradukado



Ĉu la koncepto de tradukado per maŝino estas kontraŭdira en si mem? Aŭ ĉu eblas dispartigi tradukadon en aŭtomatan kaj ne-aŭtomatan elementojn? La aŭtoro, konsilanto pri elektron-aŭtomatoj ĉe IBM en Hamburg, informiĝis pri la plej aktuala stato de esploroj pri maŝin-tradukado kaj raportas por "Esperanto" pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de la ĝisnunaj klopodoj.

Ĉu por homo, kiu ne uzas la Internacian Lingvon, telefonado transoceana povas esti lingva problemo? Ĝis nun jes; sed fantaziemaj aŭtoroj jam priskribas specon de elektronaj komputiloj*, en kiujn oni enparolas en sia lingvo, kaj el kiuj per aŭtomata tradukado samtempe elsonas la lingvo de la alparolato. Tia aparato, en poŝgrandeco, sufiĉe malmultekosta por la uzo de ĉiu interesito, fakte estus solvo de la lingvoproblemo, kiu malnecesigus Esperanton.

Lingvistoj tamen estas tre dubemaj pri tiu ideo. Ekzemple profesoro Taube, Usono, skribas en sia libro "Computers and Common Sense - the Myth of Thinking Machines", kies germana traduko aperis en 1966, ke neniam ĝis nun iu pruvis la efektivegeblon de permaŝina tradukado; ke ekzistas multegaj publikigoj pri tio, kion "devus" kapabli tradukmaŝino, sed ke neniue iam desegnis aŭ konstruis ĝin. Li rekte deklaras perfektan tradukmaŝinon malebla.

Nu, dum la Mondfoiro en Novjorko, 1964/65, efektive estis ekspoziciita maŝino, kiu tradukis el la rusa en la anglan. En aŭgusto 1966 mi vizitis Thomas J. Watson Research Center de IBM en Yorktown Heights, N. Y. (Usono), kiu konstruis tiun maŝinon kaj estas unu el la plej progresintaj institutoj en tiu fako en la mondo. Tial mi povas raporti la plej aktualan staton.

Uzo de komputilo

Unue ni devas prezenti al ni, ke por aŭtomata tradukado ni ne bezonas specialan maŝinon. Ĉiujn teknikajn kapablojn, kiuj laŭ nuna stato estas aplikeblaj al la problemo, kiel akcepti informon, memori, trakti informojn, kompari, ordigi, eldoni rezulton, jam havas la moderna universala komputilo (ekzemplon vidu en bildo 1), de kiu jam ekzistas dekmiloj en la mondo. Oni diras, ke komputilo povas solvi ĉiujn ajn problemojn, kondiĉe ke 1-e oni scias la precizan metodon de la problemsolvo kaj 2-e detale kodas** la instrukciojn en formo

de "programo", laŭ kiu la komputilo paŝo post paŝo realigas la laboron. La programado, kvankam ne tre facila, hodiaŭ estas rutina afero. La problemo, pli vere, estas evoluigi algoritmon (formalan metodon), laŭ kiu eblas pure mekanika tradukado.

Elektrona vortaro

Ĉefa elemento de la traduksistemo (tiel ni nomas la tuton de tradukmaŝino kaj tradukprogramo) kompreneble estas la vortaro, kiun enhavas la elektrona memoro. La unua ideo estis, ke sufiĉas simpla procedo por traduki vorton post vorto per la maŝino. Ni provu per la angla frazo: "The dictionary is stored on the disc prefixed by a unique (one character or byte) code and the entries in it can be looked up only after going through the so-called 'initiation' entries which are a part of the translation program." La unu-je-unu-vorta traduko estas: "La vortaro estas stokis sur la disko prefiksis per unika (unu karaktero aŭ BYTE) kodo kaj la eniroj en ĝi povas esti rigardis supren nur post iranta tra la tiel-nomita 'iniciato' eniroj kiu estas parto de la traduko programo."

Tiu preskaŭ nekomprenebla frazo montras ekzemplojn por la veraj problemoj de mekanika tradukado:

1-e Ekzistas tiel-nomitaj gramatikaj homografoj, t.e. egale skribitaj gramatikaj formoj de unu vorto, kiuj ludas malsaman rolon. Ekz. "prefixed" povas esti tradukata per "prefiksis", "prefiksita", "prefiksitaĵ", aŭ ĝi povas esti elemento de kunmetita formo: "are prefixed" = "estas prefiksitaĵ" aŭ "prefiksiĝis".

2-e Ekzistas t. n. semantikaj homografoj, t. e. egale skribitaj vortoj kun malsamaj signifoj. Ekzemple "character" ĝenerale signifas "karaktero"; sed parolante pri informtraktado, oni devas traduki per "litero" aŭ "signo".

3-e Teksto povas enhavi vortojn, kiuj ne troviĝas en la vortaro, ekzemple novformitaj fakvortoj kiel "byte" aŭ nomoj.

4-e Kelkaj vortoj povas aparteni al kunmetita esprimo, kiu devas esti tradukata sen-interrompe, ekzemple "translation program" = "tradukprogramo". Tiu problemo estas aparte grava ĉe idiomaĵoj.

* Komputi: trakti informojn per aŭtomato.

** Kodo: speciala signaro (nesekrete ĉifro).

5-e La laŭvorta traduko ne konsideras la malsamajn vortordojn de la du lingvoj.

6-e Mallongaj partikuloj, ankaŭ prepozicioj, plej ofte ne havas rektan ekvivalenton en la alia lingvo.

7-e La unu-je-unu-vorta tradukado ne atingas la gramatike ĝustajn formojn, ekz. "la tiel-nomita eniroj".

Eblaj problemsolvoj

Por parto el tiuj problemoj ekzistas taŭgaj proponoj. Ekzemple la problemo 2-a, pri la semantikaj homografoj, estas solvata tiel: se vorto havas malsamajn tradukojn en diversaj faklingvoj, la vortaro enhavas la vorton samofte kun kodita aldono de la fako. Komence de ĉiu traduktasko oni indikas la koncernan fakon (metodo de "mikroglosaroj"). Se ekzemple temas pri teksto el la fako de informtraktado, la maŝino elektas la tradukon "signo" por "character". Kompreneble tio povas kelkfoje konduki al gravaj eraroj, ĉar eĉ en in-

formtraktada fakteksto povas aperi la koncepto "karaktero". En aliaj kazoj la sistemo eldonas du tradukojn, el kiuj la leganto elektu.


Ne trovitaj vortoj (problemo 3-a) restas en originalformo, indikitaj per grandliteroj aŭ angulaj krampoj. La problemon de la kunmetitaj esprimoj (4-a) oni solvas tiel, ke la vortaro enhavas ankaŭ ilin ĉiujn krom la unuopaj vortoj. Serĉante vorton en ĝi, la maŝino estas instruciita kompari ne nur unu vorton (koneblan pro la interspaco), sed ankaŭ la postajn teksterojn, ĝis ĝi trovas la plej longan akordon. Tiu metodo kaŭzas la grandegan amplekson de la vortaroj de pli ol 100 000 esprimoj. Per la sama maniero oni solvas la problemon 6-an pri partikuloj kaj prepozicioj: "look up" estas kvazaŭ unu vorto, tradukita per "serĉi", en la specialsignifo de serĉado en vortado.

Plej malfacilaj estas la gramatikaj problemoj 1-a, 5-a kaj 7-a, kaj sur tiu kampo oni eksperimentas kun malsamaj solvopropoj.

Bildo 1: La centra regilo de IBM-sistemo 360 modelo 40



Ekzemple la gramatikaj homografoj, kiel "prefixed", enestas tiel ofte en la vortaro, kiel ili havas malsamajn funkciojn. La funkcio estas indikata per kodita, tiel-nomita "konfikso". Dum ĉiu serĉo en la vortaro la konfiksoj kune kun la vortoj estas transmetataj en la laborareon de la komputila memoro. Post la serĉo, la programinstrukcioj analizas la du aŭ tri vortojn antaŭ kaj post la tradukenda vorto. Se la maŝino trovas antaŭ "prefixed" la helpverbon "are", tiam evidentiĝas, ke nur tiu traduko kun la konfikso de kunmetita verba formo estas la elektenda. Se tie troviĝas substantivo, tiam la traduko povas esti nur partikipo.



Bildo 2: 150 000 vortoj sur unu disko

La konfikso ankaŭ entenas indikojn koditajn pri kazo kaj nombro kaj permesas tiel doni al la rezulta teksto la ĝustajn gramatikajn finaĵojn. La problemo estas facile solvebla, kiam oni tradukas en Esperanton, ĉar la programo nur devas konsideri la "n" por la akuzativo kaj la "j" por la pluralo. En multaj naciaj lingvoj la vortaro devas enteni ankaŭ indikon pri la deklinacio kaj la esceptaj formoj de la koncerna vorto, kaj la programo enhavas la regulojn de ĉiuj deklinacioj (kaj konjugacioj).

Esplorante tiujn gramatikajn problemojn, la maŝintradukistoj troviĝas en situacio, kiu memorigas al tiu de ni esperantistoj. Kvankam iliaj evoluigoj povas esti ekstreme gravaj por la lingvoscienco, multaj internacie agnoskitaj profesoroj pri lingvistiko ne partoprenas en

ilia esploragado. La esploron tial precipe plenumas la esplorcentroj de la firmoj, kiuj konstruas komputilojn. Tamen, kontraŭe al nia movado, tiuj institucioj disponas pri konsiderindaj financaj rimedoj. La malintereso de la faka lingvoscienco eble venas el tio, ke por lingvistoj la permaŝina tradukado ne estas tradukado laŭ ilia kompreno. Ĉar homa tradukisto ja tradukas tiel, ke li per sia intelekto komprenas la sencon de eldiro kaj reesprimas ĝin per la rimedoj de la cellingvo. Maŝino, aliflanke, ne povas konsideri la sencon de eldiro, sed nur efektivas la tradukadon laŭforme, baze de la vortoj kaj vortformoj, kiujn la teksto uzas. Tio estas grava diferenco.

La postredaktisto

Malgraŭ la priskribitaj solvoj, ĉiu leganto komprenos, ke tiu kruda mekanika procedo ne povas rezultigi senriproĉan tradukon. En la explorejo de IBM oni scias, ke homa lingvo neniam estas analizebla per ekzaktaj formuloj kaj reguloj ĝis tia grado, ke komputiloj de la hodiaŭ konata speco plenumos la laboron de perfekta homa tradukisto. Tial oni ne plu aspiras la evoluigon de universale aplikebla traduksistemo, sed nur sistemon por celdifinita komunikado de fakaj informoj. Ĉiuj hodiaŭ detale diskutataj sistemoj intencas nur tiel-nomitajn "Low Quality Translations" (tradukoj de malalta kvalito), eble kompareblajn kun la profesiaj krudtradukaĵoj de poemoj. En kelkaj kazoj oni postulas de la leganto la komprenon de tiu malglata teksto, sed pli ofte oni laborigas t. n. "postredaktiston", kiu forigas la malebenaĵojn kaj erarojn de la maŝina traduko. Tiu laboro estas multe pli rapida kaj facila, ol kompleta tradukado: tial komputilo povas jam nun esti ekonomia en instancoj, kiuj havas amasegon da traduktaskoj.

Hodiaŭ funkciaj tradukmaŝinoj

La sola uzanto de komputiloj por traduktaskoj ĝis nun, laŭ ĉiuj konataj informoj, ŝajnas esti la usona ŝtato, kiu funkciigis "IBM Mark II" jam en 1963 kaj poste aĉetis duan, iomete progresintan ekzempleron. Ambaŭ ankoraŭ estas specialkomputiloj, speciale konstruitaj por tiu celo, ĉar antaŭ tri jaroj sufiĉe rapida memorunuoj por la vortaro de 150 000 vortoj

В первом приближении совершенство условий определялось по ширине кривой вращения на двойном кристалл-спектрометре, который по существу представлял собой нашу установку (в первом варианте). Оказалось, что для нитевидных кристаллов, выращенных осаждением из пара, характерна узкая кривая вращения в форме острого пика с шириной менее 1°. В случае же кристаллов, выращенных кристаллизацией через пористую перегородку, ширина кривой вращения зависела от размеров кристаллов. Кристаллы большего размера давали большую ширину кривой вращения, достигающую до 1 degrees, а иногда последняя состояла даже из нескольких пиков, что свидетельствовало о сложном строении таких условий. В данной работе изучалась дислокационная структура условий с малой шириной кривой вращения.

In first approximation perfection of mustaches was determined on/by width of curve of rotation on double crystal-spectrometer, which essentially constituted our installation (in first variant). Turned out that for filiform crystals, grown by deposition/precipitation from vapor, is characteristic narrow curve of rotation in form of sharp peak with width less 1°. In case of crystals, grown by crystallization through porous partition, width of curve of rotation depended on dimensions of crystals. Crystals of large dimension gave large width of curve of rotation, reaching to 1 degrees, and sometimes the last one consisted even from several peaks that testified to complicated structure of such mustaches. In present work was studied dislocatory structure of mustaches with small width of curve of rotation.

kun traduko kaj konfliktoj estis tro multekosta en universala komputilo. (Nun tamen ekzistas same ekonomiaj, eĉ pli grandaj universalaj memorunuoj kun sufiĉa rapideco.) La maŝinoj uzas por la vortaro unikan flekseblan diskon kovritan per nigra-blankaj fotosignoj (bildo 2). Ĝi estas farita kun tia precizeco, ke ĉiuj 150 000 vortoj trovis lokon sur cirkla strio 1 centimetron larĝa. La disko turniĝas 1400-foje en ĉiu minuto, dum elektrona katodradio "legas" la enhavon. La serĉo de vorto daŭras nur 35 milisekundojn.

Ĝis nun ekzistas programo kaj vortaro nur por angla-rusa tradukado, kiujn faris stabo da fakuloj en multjara laboro. La meza tradukrapideco estas po 27 rusaj vortoj en ĉiu sekundo. Bildo 3 montras specimenan tekston, kiun la maŝino originale tradukis kaj presis en 4 sekundoj. Legante ĝin, angle parolantaj legantoj trovos, ke "mustache" evidente estas eraro: ne temas pri lipharoj, sed pri sunaj erupcioj. Espereble la postredaktisto korektis tiun eraron antaŭ la efektiva publikigo de la tradukita teksto.

La problemo de la endono

La priskribita maŝino estas tiu, kiun IBM montris dum la mondfairo. Interese estas, ke ĝi ne fakte troviĝis en la foirejo, sed oni uzis la modernan procedon de "telekomputado", konektante teleskribmaŝinon sur la stando rekte kun la komputilo trans 140 kilometroj. Jam unu du sekundojn post la endono de ruslingva frazo la skribmaŝino komencis tajpi la tradukon. Por la praktika uzado, tamen, la rapideco de skribmaŝino ne sufiĉas por ekonomie eluzi la rapidegecon de la komputilo. Tial multego da "truistinoj" unue kopias la tekston sur trukartoj aŭ trustrioj. Tiujn la komputilo povas legi kun akceptebla rapideco.

Tamen la truigado estas relative malekonomia formo de endono, kaj la estonta vasta aplikado de komputiloj kiel aŭtomatoj por "malaltkvalitaj tradukoj" kredeble dependos de la evoluigo de legmaŝinoj. Ĝis nun jam ekzistas optikaj legiloj, kiuj povas rekonii literojn kaj ciferojn, skribitajn de specialaj skribmaŝinoj. La fakindustrio klopodas evoluigi legilojn, kiuj povas rekte endoni en komputilon ĉiajn presliterojn.

Ankaŭ maŝinoj por la rekta rekono de parolitaj vortoj estas planataj. En kelkaj foiroj oni jam montris aparatojn, kiuj distingas klare parolitajn ciferojn. Tamen la problemoj de maŝinrekono de ordinare parolita teksto estas multe pli grandaj; ekzemple oni ankoraŭ ne havas ideon, kiel maŝino distingu inter la anglaj vortoj "to", "two" kaj "too", ĉiuj sonantaj "tu", aŭ kiel dum flua parolo ĝi ekkonu la limon inter la vortoj.

Kiu ŝanco nun ekzistas, ke oni atingos, dum la venontaj jaroj aŭ jardekoj, sistemojn por pli altkvalitaj tradukoj? Multaj institucioj ja sin okupas pri la tasko, sed la senpere strebata celo ĉie estas nur sistemoj por malaltkvalitaj tradukoj inter pluraj lingvoparoj (ekz. ĉina-angla, angla-germana, angla-franca ktp.).

En Yorktown Heights oni aspiras plibonigon per nova metodo de gramatikaj struktur-analizoj. Laŭ tiu metodo la strukturo de frazo povas esti prezentata per grafikaĵo, kiu memorigas al arbo kun siaj branĉoj. Oni provas, uzante la konfliktojn en la maŝina vortaro, generi tiun strukturaron per nur mekanika analizo, t.e. aŭtomate ekkoni la frazelementojn kaj ilian interdependecon. Nur progresoj en la sfero de sintakso (frazostrukturo) ebligas iom pli bonan kvaliton en kazoj de la enŝovita propozicio, aŭ de la splitita predikato, kiu ofte okazas en germanlingvaj frazoj, kaj en aliaj oftaj kazoj.

Perspektivo

Ĝis nun ni pritraktis fakte tri ŝtupojn de maŝinaj tradukmetodoj:

1-e la unu-je-unu-vortan tradukadon, kiu ne donas uzeblajn rezultojn,

2-e la tradukadon kiu kunuzas la antaŭajn aŭ postajn vortojn, kiel en la sistemo IBM Mark II,

3-e la tradukon de ĉiu kompleta frazo post sintaksa analizo de ĝia arbostrukturo, kies eblecon oni nun esploras.

Sed eĉ la sintaksa analizo ne solvas problemojn, en kiuj la traduko nur fariĝas korekta, se la tradukisto komprenas la signifon. Ni prenu la anglajn frazerojn "Animals which eat men" (bestoj, kiuj manĝas homojn) kaj "Animals which men eat" (bestoj, kiujn manĝas homoj). Tradukante ilin en la germanan lingvon, de ambaŭ oni ricevas: "Tiere, die Menschen essen." Kiu el la du signifoj estas la ĝusta? Nu, germana aŭtoro neniam dubigas siajn legantojn, ĉar bonstila esprimo en la du kazoj nepre devus esti: "Tiere, die Menschen fressen" kaj "Tiere, die der Mensch ißt", respektive. Por tiu lingvouzado ne ekzistas formuloj kaj reguloj. Alia ekzemplo: La simpla frazo "Mi iras en la urbon" povas esti tradukata kiel "I go into the city", sed lerta maŝinsistemo eble ankaŭ eltrovos la tradukon "I go downtown". Tamen eĉ la plej lerta maŝino ne scius, kiun el la du tradukoj ĝi devus preferi en certa kazo.

Por vere altkvalita tradukado necesus atingi de kvara ŝtupo de la maŝinaj tradukmetodoj, kiu entenus "semantikan analizon" de la kompleta frazo (aŭ eĉ paragrafo), do analizon de la signifo de la vortoj. Malgraŭ ideriĉaj klopodoj de la komputilistoj, ĝis nun tute ne videblas vojo al tiu celo. Kiel konkurenco al la Internacia Lingvo la tradukmaŝino dum ankoraŭ longa tempo restos tial nura sonĝo.

Kostoj de Multlingveco en U.N.

En la lasta tempo la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj en New York publikigis plurajn dokumentojn, en kiuj troviĝas pliaj informoj pri la grandegaj kostoj de tradukado kaj interpretado.

La 5-an de julio 1966 estis publikigita la Dok. E/4232, kiu enhavas partojn de la Sesa Raporto de la Konsulta Komitato pri Buĝetaj kaj Administraj Demandoj. La Raporto estis prezentita al la 21-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo. La Raporto konstatas, ke la kostoj de unu tipa konferenco kun simultana (samtempa) interpretado en 4 lingvoj, protokoloj kaj aliaj servoj de tia konferenco estis en 1962 meze 1 425 dolaroj. La Komitato opinias, ke oni devas taksi la nunajn kostojn por meza konferenco (inkluzive la plej etajn, okazas ĉ. 3000-4500 konferencoj jare) je 1 765 dolaroj (p. 7). En la Raporto la Komitato plue traktas la tutan problemaron de konferencoj kaj kunvenoj de U.N. kaj konstatas, ke la nombro de tiaj renkontiĝoj daŭre kreskas, kio kaŭzas multajn malfacilaĵojn, unuavice tial, ĉar la nombro de spertaj tradukistoj kaj interpretistoj estas limigita, kaj poste ankaŭ tial, ĉar la kostoj estas tre grandaj (p.11). Sur la p.14 la Konsulta Komitato estas aparte alarmita pro la altaj kostoj de multaj dokumentoj. Ĝi konstatas, ke — prenante en konsideron nur la kostojn por tradukado, reviziado, tajpado kaj multobligado — unu paĝo de franca aŭ hispana traduko kostas 25 dolarojn. Tiamaniere, kiu ajn raporto aŭ dokumento de ĉ. 200 paĝoj kostas ĉ. 15 000 dolarojn nur por tradukado, tajpado kaj multobligo, se ĝi estas verkita en 4 laboraj lingvoj. *"La tuta giganteo de tiuj ĉi kostoj estas montrita per la sumo de rektaj elspezoj por la oficistaro de tiuj ĉi servoj, kiu atingis ĉ. 6,5 milionoj da dolaroj por 1965"* (p.14).

En ligo kun la malbona financa situacio de U.N., la Ĝenerala Asembleo decidis per sia Rezolucio 2049 (XX) de la 13-a de decembro 1965 esplori la financojn de U.N. kaj de la t.n. specialigitaj organizaĵoj. Komitato de Ekspertoj, fondita speciale por tiu celo, prezentis sian Duan Raporton pri la afero al la 21-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo. La ampleksa Raporto de entute 71 paĝoj estas publikigita kiel Dok. de U.N. A/6343 de la 19-a de julio. Ankaŭ tiu ĉi Raporto pritraktas la kostojn de diversaj konferencoj kaj kunvenoj. Ĝi konstatas la grandajn malfacilaĵojn, kiujn kaŭzas la multlingveco, interalie ankaŭ tial, ĉar la nombro de interpretistoj, reviziistoj, tradukistoj kaj protokolistoj estas limigita, kaj de jaro al jaro tio ĉiam pli sentiĝas. En la Raporto estas dirite, ke la dokumentaro por la somera Sesio de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. konsistis el 8000 paĝoj en 1962. La dokumentaro por la somera sesio de 1965 kreskis al 11000 paĝoj, *"kiuj kostis al U.N. la sumon de preskaŭ*

duono de miliono da dolaroj nur por la tradukado" (p.47). Oni komprenu bone: tio rilatas nur al unu sesio de unu organo de U.N.

Tre interesaj informoj rilate la kostojn de tradukado kaj interpretado troviĝas en la Dok. A/C.6/L.600 de la 19-a de oktobro 1966, kiu enhavas la takson de kostoj por internacia konferenco pri la juro de traktatoj (internaciaj kontraktoj). Laŭ tiu takso, la kostoj por la interpretistoj estos 157 565 dolaroj, se la konferenco havos 2 ĉefajn komitatojn kaj se ĝi okazos en du partoj, nome en New York kaj en Genève; la kostoj de tradukado de la preparaj dokumentoj estos 14 000 dolaroj; la kostoj de tradukado en la 2 komitatoj estos 60 150; la kostoj de tradukado en la stadio de la plenaj kunvenoj estos 63 424 dolaroj. *Tiamaniere la sumo de kostoj por interpretado kaj tradukado de tiu konferenco estos 295 139 dolaroj.* Necesas akcenti, ke la menciitaj kostoj rilatas nur al la interpretado kaj tradukado, do ne inkluzivas la kostojn de tajpado kaj multobligado de diversaj dokumentoj.

Lukto por la Franca en U.N.

Dum la 21-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de U.N. la delegacioj de la france parolantaj nacioj vizitis U Thant kaj postulis, ke la franca lingvo, kiel unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de U.N., fakte ĝuu en la praktiko de U.N. tiun pozicion. Malgraŭ la grandegaj kostoj de plurlingveco en U.N., la france parolantaj delegitoj insistis pri adekvata uzado de la franca. *S-ro Maurice Couve-de-Murville*, la ĉefdelegito de Francujo, akcentis tion tuj en la komenco de sia inaŭgura parolado de la 28-a de septembro 1966. Parolante pri la uzo de la franca kiel labora lingvo, li diris: "Konsiderante la originajn decidojn prenitajn en tiu ĉi afero rilate niajn laborlingvojn, kaj konsiderante la kreskintan nombron de france parolantaj nacioj, ni opinias, ke la situacio estas neniel kontentiga. Kvankam ioma progreso estas farita en la lasta tempo je la insista postulo de la interesitaj delegacioj, multo ankoraŭ devas esti farita por reveni al la normala situacio. Estas imperativo, ke la necesa klopodo estu entreprenita" (Dokumento de la Konstanta Misio de Francujo ĉe U.N.).

S-ro Baroum, kiu parolis france, diris en la kunsido de la 4-a de oktobro: "Mi deziras esprimi la opinion de mia lando, kiu bedaŭras la traktadon de la franca lingvo, akceptita kiel unu el la laborlingvoj de la Organizaĵo en plena egaleco kun la angla. Mia delegacio esperas, ke estos entreprenitaj paŝoj por ripari rapide tiun maljustaĵon". *S-ro Baroum* forgesis aldoni tiurilate la egalrajtecon de la hispana, sed tio ne gravas. La reagoj de la ruse kaj ĉine parolantaj nacioj ne estas konataj. Siavice, *d-ro E. D. Zinsou*, ĉefdelegito de Dahomeo, deklaris dum la kunsido de la 7-a de oktobro 1966: "Ni,

france parolantaj, ne havas kiun ajn komplekson de malsupereco kaj ankoraŭ malpli de supereco. Ni ne postulas kiun ajn privilegion, aŭ favoron. Sed ni same tiel ne estas pretaj rezignacie akcepti, ke oni altrudu al ni, en diversaj funkcioj de tiuj ĉi organismoj kaj rilate la rimedojn de laboro je nia dispono, intrigojn kaj diskriminaciojn. Se mi tion ĉi diras de sur tiu ĉi tribuno tiel solene, ĝi estas farita, por ke nia tiurilata firmeco ne lasu kian ajn dubon ĉe kiu ajn". *S-ro Sidikou* (Nigero) postulis "la reestablon de ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de la franca lingvo por ebligi al la france parolantaj delegacioj doni sian gravan kontribuon al la idealoj, kiuj estas formulitaj en la Ĉarto". La saman postulon faris *s-ro Bourguiba* (Tunizio), kiu postulis egalan uzon de la franca kiel labora lingvo. *S-ro Ganao* (Kongo, Brazzaville) diris interalie: "En la nuna momento ni konstatas — ne sen amaro — ke la spaco lasita al la franca kiel labora lingvo ne plu respondas al la vera efikeco kaj graveco de tiu ĉi valorega instrumento de civilizo". *S-ro Guimali* (Centra Afrika Respubliko) parolis sufiĉe longe pri la graveco de la franca kaj konkludis, ke la uzo de la franca en U.N. "estas pli demando de justeco, ĉar ne estas juste malaltigi unu el la grandaj laboraj lingvoj al la dua loko kompare kun la alia". Fine, en kunsido de la Sesa Komitato (jura) de la Ĝenerala Asembleo la franca delegito *s-ro Deleau*, parolante pri la konsisto de la Laborgrupo trastudonta la problemon de la rajto de azilo, deklaris eksplicite: "La nombro de france parolantaj reprezentantoj en la Laborgrupo estas, tamen, malgranda. En la estonteco, kiam oni formos tiajn grupojn, oni devos atenti al la bezono de justa lingva distribuo". Necesas ĉi tie atentigi, ke konforme al la Ĉarto oni efektive devas atenti nur al justa geografia distribuo, tiel ke ĉiuj mondopartoj estu reprezentitaj. La postulo pri justa "lingva distribuo" estas io tute nova kaj ne havas bazon en la Ĉarto. (Ĉiuj informoj kaj supraj citaĵoj laŭ la Dok. de U.N. A/PV.1428 de la 4-a de oktobro, p. 27,51,52; A/PV.1434 de la 10-a de oktobro p.46 kaj 51; A/PV.1443 de la 14-a de oktobro, p.97-98; A/PV.1441 de la 13-a de oktobro, p.82; A/C.6/SR. 926 de la 7-a de novembro, p.2).

Plia Labor-lingvo en Unesko

La Ĝenerala Konferenco de Unesko havas 8 oficialajn lingvojn. La multnombraj komplikaj, kiujn kaŭzas tiu abundo de oficialaj lingvoj, devigis la Ĝeneralan Konferencon akcepti la formulon de laborlingvoj. En la komenco nur la angla kaj franca havis tiun pozicion. Poste, sub la premo de la hispane parolantaj landoj, oni devis aldoni la hispanan. Kiam Soveta Unio aliĝis al Unesko, ĝi postulis la pozicion de laborlingvo por la rusa, kaj oni devis cedi. Nun, dum la lasta Sesio de la Ĝenerala Konferenco, okazinta en Parizo en oktobro-novembro, la Ĝenerala Konferenco enkondukis por la estonteco ankaŭ la araban kiel

laboran lingvon. Tiu decido estis akceptita de la Pleno per 64 voĉoj kontraŭ 11 kun 9 sinde-tenoj. Do nun la Ĝenerala Konferenco havas 8 oficialajn lingvojn, el kiuj 5 estos laboraj. Necesas aldoni, ke, se la Konferenco okazas en lando, kies lingvo ne estas labora, tiu lingvo estos uzata kiel plia labora lingvo dum la koncerna konferenco laŭ la decido de la Plenuma Komitato.

Skandinavia Propono al Unesko

Danlando, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedujo prezentis al la Ĝenerala Konferenco de Unesko Proponon, ke la "Ĝenerala Direktoro destinu la necesajn financajn rimedojn en la Projekto de la Programo kaj Buĝeto por 1969-1970 kun la celo establi Internacian Komisionon, konsistantan el pedagogiaj, lingvosciencaj kaj teknikaj ekspertoj, por objekte konsideri en kiuj sferoj ekzistas bezono por internacia lingvo kaj por esplori la eblecojn havigi rimedojn de komunikado por kontentigi tiujn bezonojn" (14 C/DR. 164 (P) de la 18-a de novembro 1966). La Propono estis pritraktita de la Dua Subkomisiono, kiu okupiĝis pri la estonta programo de Unesko sur la kampo de sociaj, humanismaj sciencoj kaj kulturo (Dok. 14 C/PRG/S-C. II/10 de la 23-a de novembro 1966). Tiu Propono, kune kun aliaj proponoj rilatantaj al la estonta programo, formas direktivojn por la Ĝenerala Direktoro, kiu devos pritrakti la aferon konsiderante la Proponon (14 C/PRG/13 de la 22-a de novembro 1966).

Observanto de UEA ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko

Dum la prezidanto kaj la direktorino de la C.O. de UEA estis en New York por prezenti, kune kun la aliaj membroj de la Delegacio de UEA, la konatan Proponon al la Sekretariato de U.N., en Parizo okazis la 14-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Laŭ la komisiono de la prezidanto, la Konferencon partoprenis *s-ro Jean Thierry* kiel oficiala observanto de UEA. Li ĉeestis preskaŭ ĉiujn kunsidojn, sekvis la laborojn kaj bonege reprezentis la Asocion. Okazis, ke dum unu kunsido de la Dua Subkomisiono de la Komisiono por la Programo iu delegito asertis, pro nescio de bazaj faktoj, ke "Esperanto ne sukcesis". *S-ro Jean Thierry* tuj petis la parolon kaj havis la okazon interveni en la kunsido de la 21-a de novembro. En sia konciza, sed bonege pripensita interveno, *s-ro Thierry* mallonge prezentis la atingojn de Esperanto en la lastaj jaroj kaj aparte emfazis la fortikiĝon de UEA kaj la kontribuon de la Asocio al la laboro de Unesko. Li finis sian intervenon per jenaj vortoj: "Esperanto permesas profunde proksimigi la homojn kaj protektas — *kun egala respekto por ĉiuj lingvoj kaj ĉiuj dialektoj* — la diversecon de kulturfamilioj, kio konsistigas la riĉaĵon de la kultura heredaĵo de la homaro".

Laŭ la informo publikigita fine de novembro de *United Press International*, la homoj povas pli bone tradukadi, ol la komputiloj. Dum 10 jaroj ekspertoj esploris kaj eksperimentis la tradukadon, precipe de la rusa al la angla, per komputiloj. Tio kostis 19 milionojn da dolaroj. Siavice, la Nacia Konsilantaro de Esploro en Usono, kiu havis subvenciojn de diversaj instancoj, inter la aliaj de la Departemento de Defendo kaj de la Nacia Scienca Fondaĵo, studis dum 2 jaroj la rezultojn de aŭtomata tradukado. En Raporto pri la rezultoj de tiu studo la Konsilantaro konstatas, ke la tradukistoj faras pli efike kaj pli bone la taskon, ol la komputiloj. Laŭ la Raporto, la komputiloj laboras 21 procentojn malpli rapide ol la tradukistoj; la tradukistoj estas konsiderinde malpli kostaj; rilate la ekzaktecon, la komputiloj postrestas 10 procentojn malantaŭ la homoj; fine la komputiloj estas 29 procentojn malpli kompreneblaj. Rezulte la ekspertoj konkludas, ke "en la senpera aŭ antaŭvidebla estonteco la komputiloj ne povos kontribui al tradukado por praktikaj celoj".

Donacoj al CED

	£	s	p
La stato en junio 1966	74	19	6
Nord-Okcidenta Esp.-Federacio, Britujo	1	12	0
S-ro H. Künzel, Germanujo	1	1	8
S-ro T. Boersma, Nederlando		9	0
S-ro T. Boersma, Nederlando		10	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
F-ino P. C. Sinclair, Britujo	1	0	0
S-ro Mario Bardini, Italujo		10	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	1	0	0
D-ro A. Albault, Francujo		11	0
S-ro P. Hendriks, Nederlando		10	0
Anonima donacinto, Usono		1	16
S-ro E. F. Dean, Britujo	10	0	0
Prof. Waringhien, Francujo		15	0
S-ro H. Künzel, Germanujo	1	4	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	5
S-ro L. Minnaja, Italujo	5	0	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	6
S-ro E. F. Dean, Britujo	10	0	0
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1	0	0
S-ro Lieberman, Usono		16	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	6
La stato je la 3-a de dec. 1966	119	5	7

Tutkoraŭ dankon al ĉiuj donacintoj. Apartan dankon al tiuj donacintoj, kiuj regule finance helpas al CED. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

LA ESTRARO DE UEA KORE GRATULAS

al sia membro s-ro Maurice Jaumotte pro lia 50-jara jubileo kiel esperantisto kaj 40-jara jubileo kiel prezidanto de sia loka grupo.

La novaj perspektivoj ebligas agi ankoraŭ pli fruktodone laŭ la Dua Baza Laborplano. Observante ĉiujn sugestojn kaj metodojn de informado konforme al la Principaro de Frostavallen, ni tamen devos aparte akcentadi du punktojn: la lingvan diskriminacion kaj la gigantajn kostojn de multlingveco, kiujn finfine devas pagi la ordinaraĵoj civitanoj. Unu tuŝas la koron, la alia la poŝon. Samtempe necesos laŭplane daŭre vastigadi la praktikajn aplikojn de la lingvo, por ke ĝi donu kiel eble plej grandan utilon al ĉiuj uzantoj. Tio siavice, se objekte prezentita, instigos al pli ampleksa lernado, nombre kreskigos la Esperanto-Movadon kaj fortikigos UEA.

En la nunaj kondiĉoj tio estas esence grava. Nur forta kaj unueca UEA, kun agemaj Komitato kaj Estraro — ĉi-jare la membraro denove havas la eblecon elekti al la Komitato la plej taŭgajn personojn por tiu respondeca funkcio — povas sukcese fronti la nunan situacion, kiu ĉiam pli maturiĝas por la akcepto de la Internacia Lingvo kiel sola komunikilo en internaciaj rilatoj.

Al ĉiuj persone feliĉan kaj prosperan Novan Jaron! Al UEA kaj al la Esperanto-Movado ĝenerale novajn sukcesojn kaj pliajn atingojn por la Internacia Lingvo!

Prof. d-ro Ivo Lapenna

UNESTENO: Universala Esperanta Stenografio

Okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro aperis tiu ĉi gravega libro, verkita de J. J. Sturzenegger kaj Heinrich Matzinger. La verko havas 294 paĝojn kaj estas publikigita de la Eldonejo Mondo en Zürich, sub la aŭspicioj de UEA kaj la Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio. Ĝi enhavas antaŭparolon de s-ro E. Carlén, Vicprezidanto de UEA.

Tiuj ĉi kelkaj linioj ne estas recenzo. Kompetentaj personoj faros tion en diversaj Esperanto-periodaĵoj, tre verŝajne ankaŭ en alilingvaj. Mi nur deziras atentigi, ke ambaŭ aŭtoroj estas konataj specialistoj pri stenografio kaj ke unesteno — mallongigo de *Universala Esperanta Stenografio* — estiĝis post profunda ekzameno de antaŭaj kaj nuntempaj sistemoj kaj post vastaj lingvaj esploroj. Kunlaboris pli ol 50 personoj de diversaj landoj kaj lingvoregionoj, kio siavice garantias maksimuman perfektecon.

La sistemo unesteno konsistas el du partoj: la koresponda skribo por personaj notoj kaj por korespondado inter personoj parolantaj la Internacian Lingvon; la rapida skribo por laŭvorta stenografiado. Ĉio estas tre detale klarigita kun multaj trafaj ekzemploj. La lernolibro tial taŭgas ankaŭ por instrui sin mem.

Gratulante tutkore al la aŭtoroj kaj al la eldonejo Mondo, mi povas nur varme rekomendi tiun ĉi lernolibron pri unesteno al ĉiu.

Ivo Lapenna
Prezidanto de UEA

REVUO

ESPERANTO

INTERNACIA

59a Jaro

1966

Redaktoro:
D-ro V. Sadler

Oficiala organo de
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Indekso 1966

Afriko	112,	123
Akademio	8,	16
Alfabetoj, analfabeteco	61, 62, 82,	112, 123
Argentino	75, 118, 135,	197, 200
Arto	28, 44,	131
Aŭstralio	56,	135
Aŭstrujo	10,	49, 177
Aŭtomatigo	88,	133
Belartaj konkursoj: vidu "Konkursoj"		
Belgujo	75, 96,	178, 201
Bibliografio	75	
Bibliotekoj	8,	74
Brazilo	13, 98, 135,	177, 200, 201
Britujo	13, 35, 64, 75, 98,	135, 177, 200
Bulgarujo	13, 35, 56,	96, 178
CED: Dokumentoj	53,	93
Esperanto-stratoj	92	
Juro kaj diplomatio	110	
Komerco	111	
Lernejoj	92,	156
Nobel-premio por paco	53	
Opinioj pri Esperanto	52	
Radio-elsendoj en 1965	92	
Sciencistoj-esperantistoj	92	
UEA en Unesko-eldonaĵoj	53	
Universala ekspozicio	53	
Universitatoj	92,	157
Cejlono	55,	177
Citaĵoj	25,	52
Ĉeĥoslovakujo	35, 55, 78, 96,	114, 170, 177
Ĉinujo	55,	177
Danujo	75	
Delegitoj	173	
Edukado	201	
Ekzamenoj	34,	153
Eldonaĵoj laŭ titoloj:		
<i>Alvoko de l' silento</i>	94	
<i>Anne-Frank-broŝuro</i>	94	
<i>Bestkalendaro</i>	54	
<i>Bona rido</i>	198	
<i>Ĉasado kun Avĉjo</i>	95	
<i>Dicionário Português-Esperanto</i>	95	
<i>Dio momento de l' evolucio</i>	73	
<i>Dudek horoj</i>	199	
<i>25 jaroj de soveta Litovio</i>	73	
<i>Edukado internacia</i>	165	
<i>El japana literaturo</i>	72,	95
<i>En la flamoj voluptaj de l' amo</i>	94	
<i>Esperanta mozaiko</i>	9	
<i>Esperanto: A New Approach</i>	32	
<i>Esperanto I</i>	94,	165
<i>Eterneco</i>	198	
<i>Freedom of Speech</i>	12	
<i>Geologio</i>	176	

<i>Gepatra bulteno</i>	101	
<i>Graĵnoj en vento</i>	44,	201
<i>Gvidlibro tra Paris</i>	9	
<i>Infanoj en vento</i>	199	
<i>Inter du mondepokoj</i>	94	
<i>Islanda-Esperanta vortaro</i>	54	
<i>Jānis Rainis, latva popola poeto</i>	32	
<i>Katalogo de elektitaj libroj en Esperanto</i>	37,	74
<i>Kvin virinoj de amo</i>	198	
<i>Leteroj el Ĉinio</i>	54	
<i>Listo de lokaj Esperanto-societoj</i>	92	
<i>Magia peniko</i>	95	
<i>Malsaĝa avo</i>	95	
<i>Maskerado ĉirkaŭ la morto</i>	167	
<i>Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá</i>	9	
<i>Mio mia</i>	9	
<i>Modernaj lignogravuraĵoj de Ĉinio</i>	113	
<i>Monda Kulturo</i>	9,	25
<i>Monoteismo kaj pozitiva moralo</i>	33	
<i>Mozaiko de lumo kaj ombro</i>	176	
<i>Niaj plej grandaj verkistoj</i>	176	
<i>Nia korpo</i>	167	
<i>Popolaj komunumoj antaŭenmarŝas</i>	54	
<i>Rakontu samideano</i>	176	
<i>Refuto al la t.n. 'unuigita agado'</i>	134	
<i>Reĝo Lear</i>	70	
<i>Respondaj leteroj de la C.K. de JKP</i>	134	
<i>Retoriko</i>	32	
<i>Rusa-Esperanta vortaro</i>	112	
<i>Sekreta informilo</i>	134	
<i>Socialisma industriigo</i>	54	
<i>Sub la ĉielo</i>	32	
<i>Tiel li vivis</i>	33	
<i>Tragedio de l' homo</i>	70	
<i>Utaŝta poemaro</i>	199	
<i>Varma sudo kaj frosta nordo</i>	95	
<i>Versoj elektitaj</i>	134,	166
<i>Versoj por infanoj</i>	112	
<i>Veterano ?</i>	95	
<i>Vivu la venko de popola milito</i>	54	
<i>Vuk</i>	198	
Eldonaĵoj plej vendataj en 1965	73	
Eldonaĵoj ricevataj	12, 33, 54, 73, 99, 113, 134, 158, 167, 176,	199
En la grupoj	12, 37, 76, 119,	138
Estraraj decidoj	81,	145
Faka aplikado de Esperanto	147, 155,	173
Familia uzo de Esperanto	101, 106,	126
Fervojistoj	14,	135
Festparolado de la 51-a UK	142	
Filatelio	55	
Filmoj: vidu "Kino"		
Financoj	74, 138, 180,	203
Foto-konkurso: vidu "Konkursoj"		
Francujo	14, 36, 55, 56, 114, 136,	178, 200
Germanujo	13, 35, 56, 96, 177, 178,	200, 201
Graĵnoj en vento	44,	201
Grekujo	55	

Generalaj kunvenoj de UEA	147	Koreujo	115, 201
Hejma uzo de Esperanto	101, 106, 126	Kotizoj	172, 195
Hindujo	35, 55, 75, 170	Lerneja Bulteno	68, 163
Hispanujo	35	Lernejoj (vidu ankaŭ: CED, Instruistoj):	
Historio	53, 96, 108		44, 135, 145, 156
Hungarujo 10, 13, 36, 55, 66, 78, 84, 96, 97		Leteroj	33, 74, 76, 113, 132, 166
	108, 114, 135	Libano	55
Informado (vidu ankaŭ: CED) 21, 51, 89, 104, 121		Libroj: vidu "Eldonaĵoj"	
	147, 153	Lingva problemo en Afriko	112
Instruado	25, 35, 42, 69	en juro kaj diplomatio	110
Instruistoj (vidu ankaŭ: Lernejoj)	96, 165, 166	en komerco	111
Internacia Arta Festivalo	97, 148	en la japana parlamento	103
Internacia ekzameno	34, 153	Lingvoj etnaj	26, 64, 82, 84, 128, 133
Internaciaj konkursoj: vidu "Konkursoj"		Lingvologio	75
Internacia Somera Universitato	97, 152, 202	Literaturo (vidu ankaŭ: Eldonaĵoj)	
Irako	35	ĝenerale	2, 51, 76, 96, 115, 170, 177
Israelo	36, 55, 78, 114, 116, 138, 166, 174, 177	hungara: "Plori, plori, plori" de Ady E.	131
Italujo	7, 69	japana: "Songoj en 10 noktoj" de Natume	90
Japanujo 13, 35, 63, 102, 103, 115, 128, 136, 170		jida: "Omleto de Riĉuloj", Salom Alejhem	130
	177, 201	originala: "Beta splendens" de E. Felix	31
Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK): vidu "Propono"		"Lasta paŝo" de A. Szabó	50
Jugoslavio	13, 37, 53, 75, 115, 135, 178	Lokaj societoj (vidu ankaŭ: En la grupoj)	92
Juna Vivo, La 14, 36, 56, 78, 98, 118, 136, 168		Madagaskaro	56, 200
	178, 200	Mallongaj novaĵoj 13, 35, 55, 75, 96, 114, 135	
Junularaj kongresoj: vidu "Kongresoj"			170, 177, 201
Junulara movado, TEJO	36, 56, 101, 136	Malto	35
Juro kaj diplomatio	110	Meksiko	177
Kalendaro	38, 99, 138, 180	Membraro	180
Kampado	13	Membro-statistiko	38, 58
Kanado	115, 201	Memorando al U.N.	194
Kino	13, 135, 170	Memoriga kalendaro: vidu "Kalendaro"	
Kolombio	170	Mongolujo	170
Komerco	111, 201	Movado ĝenerale	1, 8, 81
Komitato de UEA	146	Muziko	33
Konferencoj: vidu "Kongresoj"		Nederlando	35, 55, 96, 115, 135, 165, 170, 200
Kongo	96	Nekrologoj	12, 33, 51, 73, 99, 113, 130, 136
Kongresoj			158, 171, 180
51-a U.K., Budapest 15, 34, 57, 76, 97, 117, 141		Neŭtraleco	25
52-a U.K., Tel Aviv	15, 57, 116, 145, 179, 202	Nobel-premio por paco	53
53-a U.K.	81	Norvegujo	177
22-a IJK, Pécs	14, 36, 78, 98, 118, 168	Nov-Zelando	27
10-a Infankongreseto	153	Oceanio	26, 133
2-a Internacia Konf. de Lernejoj 16, 48, 69, 111		Oficiala informilo 16, 38, 60, 79, 100, 119, 138	
	155, 163		159, 172, 181, 203
Int. Seminario de GEJ	56, 178	Olimpikoj	61, 115
Konkursoj kaj premioj:		Oratora konkurso: vidu "Konkursoj"	
Arĝenta sprono de KOKO	148	Oriento-Okcidento, interŝanĝoj	22
Belartaj	16, 50, 76, 97, 148, 170	Politiko	25, 41, 113
Comella-Bassols	115	Pollando	13, 14, 69, 75, 115, 165, 200
Foto-konkurso	16, 97	Poŝtmarkkolektado	38, 60, 181
Internaciaj 19, 39, 60, 80, 99, 120, 140		Premioj: vidu "Konkursoj"	
	159, 172, 181, 203	Presado	88, 133
Oratoraj	148	Prononcado	74, 113, 132, 166
Konsulta Komisiono pri Lernejoj	69	Propono al U.N. 1, 7, 24, 47, 63, 93, 102, 127	
Kooperativismo	35		145, 154, 173, 185, 194
Koresponda Servo Mondskala	60, 119		

Radio	13, 18, 37, 55, 59, 77, 93, 96, 119, 137	Sud-Afriko	13
	158, 171, 177, 179, 203	Svedujo	55, 56, 115, 135, 177
Radio-elsendoj en 1965	92	Svisujo	201
Recenzoj: vidu "Eldonaĵoj"			
Religio	13, 35, 75, 115, 135	Teatro	98, 149, 177
Respondoj al kontraŭ-Esperantaj paroloj	89, 133	TEJO: vidu "Junularo"	
Rezolucioj	154	Tekniko	115
Ricevitaj eldonaĵoj: vidu "Eldonaĵoj ricevitaj"		Teksajindustrio	75
Ruĝa Kruco	170	Turismo	122, 170, 177, 200
Rumanujo	135	Turkujo	82
Scienco	13, 55	Unesko	22, 53, 161
Serva Centro de UEA	100	Universala Ekspozicio	53
Skoltoj	36	Unuiĝintaj Nacioj: vidu "Propono al UN"	
Somera Universitato: vidu "Internacia..."		Usono	35, 104, 170, 188
Soveta Unio	75, 96, 115, 166, 170, 177, 201		
Sporto	61, 115	Vjetnamujo	13, 135
Statistikoj	38, 58, 60, 69, 92, 156	Vortaro	166

LAŬFAKE

Literaturo

● Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Brazilo, baldaŭ eldonos novan tradukon el la sanskrita originalo de Bhagavad-Gītā. Ĝi enhavos apud la proza traduko ankaŭ la sanskritan tekston. Tradukis Pandiá Pāndu.

● La ĉi-jaran premion Comella-Bassols (vidu junio, p. 115) gajnis s-ro Váňa vladimir, Ĉeĥoslovakujo, per la rakonto "Milita Danco".

Matematiko

● La doktoriĝa disertacio de Aŝvinikumar' ĉe la Universitato de Amsterdam, "Hilbertaj spacoj en intuiciismo" aperis libroforme en du lingvoj: la angla kaj Esperanto, kun resumo en la nederlanda kaj hindia.

Radio

● La Papo ĵus ricevis dosieron kun 735 leteroj petantaj enkondukon de Esperanto en la elsendojn de la Vatikana Radio.

LAŬLANDE

Argentino

● Rosaria Esperanto-Asocio nun havas ĉiusabate dekminutan elsendon pri Esperanto en la hispana lingvo ĉe LRA5 Radio Nacional.

Germanujo

● La prezidanto de GEA kaj iama estrarano de UEA d-ro Wilhelm Herrmann ricevis pro sia laboro por Esperanto kaj internacia kompreno la ordenon "Bundesverdienstkreuz", 1-a klaso.

Irako

● Korespondajn kursojn de Esperanto per la angla aŭ la araba lingvo gvidas s-ro Hussain M. Al-Amily.



Kurso en Honolulu (vidu sub Usono)

Tanzanio

● Anoj de Tanzania Esperanto-Asocio havis okazon je 19 novembro viziti polan observatorian ŝipon Olesnica, kiam ĝi atingis Dar-es-Salaam. La ŝipo alportis dek anojn de pola astronomia ekspedicio, kies gvidantoj parolas Esperanton.

Usono

● En Honolulu, Havajo, ĵus finiĝis la unua tiea kurso de post la 2-a mondmilito. Gvidis Yoshimi Umeda el Japanujo kaj Bunnie J. Chambers, loka UEA-delegito.

52-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Sazar Statprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3 12-an de decembro, 1966

Honora Komitato.

Ĝis la nuna momento akceptis eniri en la Honoran Komitaton de la Kongreso: Kadish Luz, Prezidanto de la Parlamento; David Hakohen, Prezidanto de la Komisiono por Eksterlandaj kaj Sekurecaj Aferoj; Eliahu Ejlat, Prezidanto de la Hebrea Universitato en Jerusalemo; Abraham Shlonski, Poeto.

Poŝtmarko.

Okaze de la Kongreso, la Israela Ministerio pri Poŝtaj Aferoj decidis eldoni specialan memorigan poŝtmarkon. Detaloj sekvos en venontaj komunikoj.

Ekskursoj.

La Loka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso du tuttagajn ekskursojn: al Jerusalemo kaj al Nazareto. La ekskursoj okazos samtempe dimanĉon la 6-an de aŭg. 1967. Post la Kongreso okazos du tritagaj ekskursoj: al Negev (Beerŝeva, Morta Maro, k.a.) kaj al Galileo (Nazareto, Tiberio, k.a.). Ambaŭ ekskursoj okazos samtempe de la 10-a ĝis la 13-a de aŭg. 1967. Organizita de la Centra Oficejo de UEA, post la Kongreso okazos 10-taga ekskurso tra Israelo, de la 9-a de aŭg., posttagmeze, ĝis la 20-a de aŭg., matene, 1967. Detaloj pri ĉiuj ekskursoj sekvos en venontaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno.

Loĝado.

Por loĝado dum la Kongreso estos la ebleco elekti inter pluraj kategorioj de hoteloj, kies prezoj varias de ĉ. 8,— gld. (komuna loĝejo) ĝis 60,— gld. (luksa hotelo) tage. Estos ankaŭ la ebleco loĝi en Junulara Gastejo, kelkajn kilometrojn ekster Tel Aviv, je la prezo de

(daŭrigo sur sekvanta paĝo)



esperanto
januaro 1967



La 26-an de novembro 1966 mortis en Amsterdam, 59-jara, post duonjara malsano mag. Sigismundo Pragano, docento por rumana lingvo kaj Esperanto ĉe la Komunuma Universitato de Amsterdam, gvidanto de Esperanto-kursoj en la Komunuma Porinstruista Seminario de Amsterdam, membro de la Akademio de Esperanto.

Tiu ĉi forpaso estas perdo ne nur por Amsterdam, ne nur por Nederlando, sed por la tutmonda movado. Sigismundo Pragano estis unu el tiuj dekomence internaciaj esperantistoj, por kiuj Esperanto estas tia esenca parto de la vivo, ke ĝi difinas al ili la vivovojojn.

Jam 16-jara, en la mezlernejo en sia naskiĝurbo Bukareŝto, Pragano (kies origina nomo estis Prager) lernis Esperanton kaj kontaktiĝis kun Andreo Cseh kaj Tiberio Morariu. Li studis juron kaj komencis advokatan karieron. En 1931 Andreo Cseh invitis lin veni al Nederlando kaj eklabori en la kadro de la Internacia Cseh-Instituto. De tiam Pragano dediĉis sin plene al Esperanto.

Li perfekte instruis laŭ la Cseh-metodo kaj gvidis sennombrajn kursojn en diversaj landoj de Eŭropo. Li estis unu el tiuj maloftaj kursgvidantoj, kiuj havas la talenton doni al la kursanoj, krom la lingvoscio, ankaŭ tion, kio igas ilin ne plu forlasi la lingvon kaj movadon. Centoj da kursanoj liaj fariĝis fidelaj membroj de UEA.

Dum la milito Pragano devis, kiel judo, vivi kaŝita dum pluraj jaroj. Kun helpo de esperantistoj li sukcesis elteni kaj uzis la tempon por bone ellerni la nederlandan lingvon. Post la milito li sukcesis, iom post iom, en sia propra maniero, atingi pozicion por si mem kaj por Esperanto en la universitato de Amsterdam, kie li fariĝis en 1951 docento por la rumana lingvo kaj poste ankaŭ por Esperanto, ĉe la franc-rumana seminario.

Per sia persona lerteco kaj saĝeco li sukcesis malrapide forigi la antaŭjuĝojn de pluraj profesoroj kaj veki ilian intereson. Li atingis por Esperanto la pozicion de lingvo elektelebla de la lingvo-studentoj kiel dua lingvo, egalrajta al naciaj lingvoj.

La laboro de mag. Pragano en la Amsterdama Universitato havas internacian signifon. Ĝi estas ekzempla por aliaj universitatoj. Pluraj junaj multpromesaj esperantistoj estis liaj lernantoj. Unu el ili estas Aŝvinikumar', kiu studis specialan matematikan temon en Amsterdam kaj doktoriĝis antaŭ nelonge per disertacio verkita originale en Esperanto. Oni transportis mag. Pragano el la malsanulejo al la universitato por ĉeesti tiun doktoriĝon, kio donis al li grandan kontentigon kaj plezuron. Kelkajn semajnojn poste li forpasis post nova operacio. La kremacion ĉeestis pli ol 100 personoj. Inter la 8 parolantoj UEA estis reprezentita de la direktorino de la C.O., kiu mem lernis la lingvon de mag. Pragano antaŭ 32 jaroj.

M. H. Vermaas

PETER LAUFEN

Mortis en Montreal, Kanado, s-ro Peter Laufen, 28-jara Dumviva Membro kaj iama delegito de UEA. Li devenis el Germanujo kaj estis bone konata en diversaj landoj. En Montreal li gvidis kursojn de Esperanto.

ADRIAAN DE VRIES

Forpasis s-ro Adriaan de Vries en Soest, Nederlando. Li estis tre malnova membro kaj delegito de UEA.

HECTOR VERMUYTEN (1889-1966)

La 10-an de novembro mortis s-ro H. Vermuyten en Antverpeno, Belgujo. Li kompilis kaj grandparte tradukis la flandran parton de "Belga Antologio", 1928. Li gvidis multajn elementajn kursojn.

EMIL NICOLAU (1886-1966)

La 13-an de novembro forpasis Emil Nicolau, Rumanujo. Li estis sekretario de R.E.S. ekde 1910, eldonis Esperantaĵojn kaj gvidis kursojn.

AUGUST STRAUCH

Forpasis 87-jara s-ro A. Strauch, malnova membro kaj delegito en Bad Pyrmont, Germanujo.

(daŭrigo de antaŭa paĝo)

ĉ. 7,— ned.gld. por ĉiu persono en dulita ĉambro. La supre indikitaj prezoj inkluzivas dormon kaj matenmanĝon. Detaloj sekvas en venontaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno. Ĉar LKK povos akcepti mendojn por loĝado nur ĝis la komenco de majo 1967, estas nepre konsilinda tuja aliĝo al la Universala Kongreso por ricevi ĝustatempe la Duan Bultenon, en kiu troviĝas la mendilo por loĝado, **la sola dokumento valida por rezervi dormlokon dum la Kongreso.**

Novaj kotizoj.

Ekde 1.1.1967 validas la jenaj:

Kongr.	77,— gld. (308 steloj)
Edz.	38,50 gld. (154 steloj)

Jun.	24,— gld. (96 steloj)
Stud.	38,— gld. (152 steloj)
Blind.	31,— gld. (124 steloj)

Unua Bulteno kaj Aliĝilo estas riceveblaj ĉe la Konstanta Adreso de la Kongreso kaj ĉe la diversaj Landaj Asocioj.

Statistiko ĝis la 12.12.1966.

Arg. 1, Aŭstral. 3, Aŭstr. 4, Belg. 7, Braz. 2, Brit. 24, Bulg. 26, Ĉeĥ. 16, Danl. 3, Finn. 3, Franc. 67, Germ. 10, Hisp. 3, Hongkongo 1, Hung. 36, Isr. 30, Ital. 15, Jap. 3, Jug. 20, Kan. 1, Mon. 3, Ned. 27, Norv. 4, Novzel. 1, Poll. 86, Port. 2, Rum. 1, Sovet. 1, Sved. 17, Svis. 5, Usono 10, Venez. 1. Entute 433 el 32 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1966, 1-a parto, p. 170. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 50.42 m (5950 kcs), 48.90 m (6135 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.01 m (9675 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 41.58 (7220 kcs). I.P. Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 47 m, 42 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	12.30-13.00	Pekino, 25 m, 19 m. I.
	16.35-16.50	Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45	Muritiba, 216 m (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.00-12.10	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.88 m (17770 kcs), 13.98 m (21460 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	21.35-21.50	Madrid, 88.8 mcs (M.F.) K. Radio Juventud de España, Poŝtkesto 6092, Madrid (Hispanujo).
	22.45-23.00	Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	16.50-17.00	Wien, 577 m (520 kcs), 514 m (584 kcs), 293 m (1025 kcs), 25.45 m (11785 kcs), 16.78 m (17880 kcs). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Merkredo	6.45- 7.00	Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.00-12.10	Bern, Kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.35-21.50	Madrid. Kiel lunde.
	23.30-23.55	Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	21.45-21.55	Bern, 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.40 m (11810 kcs). P. (D-ro Baur)
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m (1133 kcs), P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	20.00-20.30	Pekino, 42 m, 39 m, 38 m, 32 m, 30 m. I.
	21.35-21.50	Madrid. Kiel lunde.
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.45-21.55	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro C. Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

RADIO ROMA. 1-I, Ĉe la sojlo de la nova jaro; 8-I, Tra la literaturo; 15-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-I, Leterkesto; 29-I, Kristana mondo; 5-II, La itala poeto Guido Gozzano; 12-II, Italaj regionoj: Emilio; 19-II, La fama kantisto Enrico Caruso; 26-II, Italaj turismaj urboj: Novara. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

BRITA RADIO (B.B.C.) elsendas en Esperanto la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato dum la duonhora bulgarlingva programo. Daŭrigo dependos ĉefe de la reagoj de orienteŭropaj aŭskultintoj. Adreso de la stacio: B.B.C., Bush House, London WC2, Britujo.


LA SUBSKRIBO-KAMPANJO

Ni memorigas, ke laŭ decido de la Estraro la kolektado de subskriboj por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj plu daŭros, ĝis tiu organizaĵo donos al la afero konkretan sekvon. (Vidu en "Esperanto", decembro, p. 197). Novaj subskribfolioj estas ĉiam mendeblaj ĉe la Centra Oficejo

de UEA.

La spaco nun ne permesas al ni listigi ĉiujn eminentulojn kaj gravajn organizaĵojn, kiuj subskribis en la lastaj monatoj de la kampanjo, nek menci i individue la plej aktivajn kolektantojn. Al tio ni revenos en posta eldono.

esperanto
janvaro 1967



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

REAPERIS "INFO"

La interna informfolio de TEJO por komitatanoj, landaj sekcioj, estraranoj, ktp. reaperis. Ĝin redaktas la ĝenerala sekretario (Humphrey Tonkin), kaj administras Ulrich Lins.

La bulteno celas plifortigi la kontakton inter la funkciuloj de TEJO kaj de la LS-oj, por ke ĉiu laboro farita kaj planata daŭre kunordiĝu kaj fariĝu ĉiam pli kvalita.

La InFo respegulas la ampleksan kaj multflankan agadon fare de la TEJO-estraro kaj ĝiaj kunlaborantoj. "La Juna Vivo", kiu unuavice celas diskonigi la vivon de la LS-oj, devas kutime prisilenti tiun laboradon de la internacia TEJO. Nur Lernejoj, Kasistaj kaj NEJO-bultenoj raportis ĝis nun pri tiuj temoj. InFo nun anstataŭos kaj kompletigos ilin.

LA UNUA KONGRESO DE STELO EN RUSE

okazis en aŭgusto kun multa sukceso. En la varia programo aparte interesaj por TEJO estis la diskutoj pri la estonta kunlaboro inter STELO kaj TEJO. STELO decidis akcepti la proponitan interkonsenton pri kunlaboro inter TEJO, STELO kaj ISAE, kun kelkaj malgrandaj ŝanĝoj.

KOREA ESPERANTO-JUNULARO aktivas en Seul por aktivigi novajn, junajn esperantistojn. KEJ organizas ekskurson, seminarion por gvidantoj de universitataj kaj aliaj rondoj, ktp. Ankaŭ en Taegu la junularo tre aktivas kaj okazigos Esperanto-vesperon kaj seminarion en la kadro de la Taegu-kongreso.

(rap.: Semanto Taekeng Gim)

BRILA FESTO DE LA BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

BEJ denove manifestis siajn atingojn en kultura aktivado, organizinte la 7-an Festivalon en la pitoreska urbo Loveĉ. En tiu "urbo de la siringo, la muziko kaj la kantoj" kolektiĝis pli ol 1300 gejunuloj el tuta Bulgarujo.

"Kiam la siringoj floras, Loveĉ kantas" diras loka proverbo. Krom la siringo ankaŭ la Urba Reprezenta Ĥoro meritas tiun famon. Konsistante el 150 kantistoj, ĝi malfermis la festivalon per koncerto, kiun sekvis salutvortoj de gravuloj. La Bulgaraj presagentejo, radio kaj televido ĉeestis la solenaĵon, same kiel oficialaj reprezentantoj, kaj gastoj i.a. el Sovetunio kaj Anglujo. La Festivalo sendis telegramojn al landaj aŭtoritatuloj kaj al UEA/TEJO.

La festivalajn programerojn mem prezentis ĉ. 18 ensembloj kaj trupoj, apartenantaj al lokaj junularaj kaj studentaj societoj. Post unutaga (kaj iom laciga) spektado de espe-

ranta kantado kaj dancoj, de deklamado kaj teatraĵetoj, de muzikado kaj elmontro de intelekta spirito, la konkludo estis, ke la festivalo de 1966 superis ĉiujn ĝisnunajn: ĝojiga fakto promesanta plian altiĝon de la belarta nivelo de tiu unika esperantista evento junulara.

Vespere okazis la "Printempa Balo", ĝis malfrue nokte. "Rozo de la Festivalo" elektigis ĉe granda konkurenco ĉarmulino el la urbo Vraca.

En la Oratora Konkurso, okazanta la trian tagon, la severa ĵurio ne aljuĝis unuan premion. La duan gajnis f-ino Velikova, studentino el Sofio. Trian premion gajnis Todorka Tonĉeva kaj Zlatka Stoilova, ambaŭ el Jambol. En la gaja "Televida konkurso" plej obstinaj kaj viglaj en la batalado estis Simeon Simeonov (Sofio), K. Petrov kaj B. Mladenov (ambaŭ el Vraca).

Dum la fermo la venkintoj ricevis la premiojn. La multnombra kolektivo de la urbo Mihajlovgrad (gvidantino Mariana Popova) ricevis la pokalon de la 7-a festivalo. La dua kaj tria lokoj estis por la ensembloj el Ruse kaj Tolbuhin.

Post la oficiala kaj emocia fermo, okazis plia gazetara konferenco kaj plenkunsido de BEJ. La membroj de la ĵurio, la aŭtoritatuloj, la estraro de BEA kaj la gazetaro donis altan pritakson de la festivalo. Ĝi estis amasa, entuziasma kaj bonnivela festo. BEJ kore invitas eksterlandajn esp-gejunulojn ĉeesti la 8-an festivalon, en aprilo 1967, en Veliko Tarnovo. Petu pliajn informojn de BEJ, Dimitr Ĵdrakov, pk. 587, Sofio.

(rap. Dim. Ĵdrakov)

*Taekeng Gim kun aninoj de Korea
 Esp-Junularo.*



ELEKTO DE KOMITATANOJ B

SPECIALA ATENTIGO AL ĈEFDELEGITOJ KAJ DELEGITOJ

La jaro 1967 estas la jaro de la elektoj de komitatanoj B. Ilia mandato komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Tel Aviv.

Laŭ la Statuto (art. 25 b) kaj la Ĝenerala Regularo (art. 28) je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro 1966 estas elektota po unu komitatano B.

Laŭ art. 28 b de la Ĝenerala Regularo, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj per tio ĉi estas invitataj fari proponojn pri la kandidatoj. Kvin ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne la vicdelegitoj aŭ fakdelegitoj) rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Ni atentigas, ke laŭ art. 30 de la Ĝenerala Regularo (vidu p. 145 de la septembra numero 1960 de la revuo Esperanto) kandidato devas esti membro-abonanto de UEA almenaŭ dum la lastaj tri jaroj, do minimume ekde januaro 1964. Por la bona funkciado de la asociaj laboroj estas necese elekti kiel komitatanojn personojn, kiuj kutimas veni al la Universalaj Kongresoj, kiuj pretas oferi kongresajn plezurojn por sidi en kunvenoj, kiuj konas la laborojn de la Asocio (regule amplekse raportatajn en la Dua Parto de la Jarlibro) kaj ĝiajn Statuton kaj Regularojn (aperintajn en la Unua Parto de la Jarlibro 1959).

La proponoj pri la kandidatoj, kun ilia skriba konsento pri la kandidatigo kaj, se eble, kun detaloj pri iliaj persono, kvalitoj, pozicio en la movado, pozicio ekster la movado ktp., devos atingi la Centran Oficejon de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, plej malfrue la 31-an de marto 1967. Proponoj, kiuj ne estos subskribitaj de 5 ĉefdelegitoj aŭ delegitoj, aŭ kiuj ne enhavos la skriban konsenton de la kandidato, aŭ atingos la Centran Oficejon post la menciita dato, ne povos esti prenitaj en konsideron.

En la elektoj de komitatanoj B esprimiĝas la deziroj de la individuaj membroj de UEA. Uzu vian rajton kaj baldaŭ ensendu viajn proponojn. Nepre agu laŭ la supraj preskriboj, por ke via propono estu valida!

FACILIGO DE FERVOJRABATOJ

Kongresanoj ricevos internacian dokumenton

Laŭ iniciato de iama KKS s-ro G. C. Fighiera, nun dua ĝenerala sekretario de internacia turisma organizaĵo, jam realiĝis nova internacia dokumento, kiu permesas al anoj de diversaj internaciaj kongresoj ricevi rabaton por fervoja veturado. Kompreneble la aranĝo, aprobita de la internaciaj fervojaj instancoj, validos ankaŭ por internaciaj Esperanto-kongresoj.

Estonte ĉiu kongresano ricevos, kune kun sia kongresa karto, specialan slipon presitan en kvar lingvoj — Esperanto, la angla, franca kaj germana — kiun li transdonos al la instanco,

ĉe kiu li mendas sian fervojan bileton. Kontraŭ transdono de la slipo li ricevos la konsentitan rabaton. Kiam temas pri revenbileto, la bileto mem devas poste ricevi stampon en la kongresejo, antaŭ ol la kongresano komencos sian reveturon.

En la teksto de la slipo la lingvoj angla, franca kaj germana estas devigaj laŭ la internacia interkonsento. La kvaran lingvon elektas libere la eldonanto, en ĉi tiu kazo UEA.

Pliaj detaloj sekvas en la Komunikoj de la Universalaj Kongresoj.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	lando	kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2860	3250	113,64
2. (5)	Usono	4526	4509	99,62
3.	Britujo	6691	6401	95,66
4. (2)	Belgujo	2055	1960	95,38
5. (4)	Francujo	7752	7257	93,61
6. (7)	Germanujo	7221	6500	90,02
7. (6)	Svedujo	7180	6440	89,69
8.	Danlando	3099	2650	85,51
9.	Nederlando	5975	5106	85,46
10.	Italujo	4253	3400	79,94
11.	Finnlando	3160	2490	78,80
12.	Svislando	2459	1830	74,42
13.	Brazilo	4142	3062	73,93
14.	Japanujo	3965	2475	62,42
15.	Jugoslavio	5560	3385	60,88

Konkurso II

1.	Kanado	842	1114	132,30
2.	Israelo	460	595	129,35
3.	Sudafriko	250	260	104,—
4.	Grekujo	270	266	98,52
5.	Aŭstralio	1475	1385	93,90
6. (7)	Nov-Zelando	1481	1355	91,49
7. (6)	Aŭstrujo	1475	1295	87,80
8.	Norvegujo	1755	1420	80,91
9.	Islando	250	185	74,—
10.	Argentino	905	630	69,61
11.	Madagaskaro	250	70	28,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39, februaro 1966. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

NOVAJ DELEGITOJ

Vidu la Jarlibron 1967/I, aperontan en marto.

NE PLU VALIDAS (EN JARLIBRO 1966)

Britujo. Folkestone: D. Macclesfield: D.

Ĉeĥoslovakujo. Prostějov: VD.

Finnlando. Kuopio: D. Vääksy: D.

Francujo. Nantes: FD (Religio: katolikismo).

Germanujo. Elmshorn: FD (Fervojo), FD (Masonistaj aferoj). Solingen: FD (Turismo).

Italujo. Alessandria: FD (Stenografio).

Madagaskaro: la peranto Randrianekena.

Nederlando. Sliedrecht: D. Soest: D.

Norvegujo. Arendal: D. Bodø: VD. Elverum: D.

Nov-Zelando. Auckland: FD (Virinaj aferoj).

Rumanujo. București: VD.

Sudafriko. Paarl: D & FD (Sindikataj aferoj).

Pretoria: FD (Instruado).

Svedujo. Karlskoga: D.

oficiala informilo
n-ro 397, 1 dec. 1966

esperanto
januaro 1967

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Casanoves, patro Manuel, Cervera, Hispanujo.
Donald, s-ro Charles H. S., London, Britujo.
Gabison, s-ro Andrea, Nov-Jorko, Usono.
Gerson, s-ino Margot H., Great Neck, Usono.
Gregory, s-ino E., Peasedown, Britujo.
Kalis, f-ino N.J.M., Deventer, Nederlando.
Lewine, s-ro John L., Nov-Jorko, Usono.
Sigmund, s-ro P., Oak Ridge, Usono.
Tinteren, f-ino J. C. van, Soest, Nederlando.
White, s-ino J., Taupo, Nov-Zelando.

MEMBRO-SUBTENANTO 1966

361. Pahlsson, s-ro Herluw, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1967

1 Hubalek, s-ro Joh., Aŭstrujo. 2 Jaehn, s-ro Wilh., Germanujo. 3 Kovács, d-ro Kalman, Jugoslavio. 4. Lewis, s-ro H. J.; 5 Price, s-ro K.F., Kanado. 6 Baaten, s-ro W.; 7 Dijk, s-ro J. P. van, Nederlando. 8 Wiltshire, s-ro Arthur G., Nov-Zelando. 9 Almén, s-ro Helmer, Svedujo. 10 Culbert, d-ro Sidney S., Usono.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (GLD.)

Brazilo: Zamora, s-ro Ary, 7,50. Danlando: Jørgensen, s-ro Gunnar, 32,20. Finnlando: Narvala, s-ro N. G., 4,50. Francujo: Feynerol, s-ro M., 7,50. Nederlando: Bossong, s-ro R. H. 7,50. Nov-

Zelando: Allan, s-ro J.T., 7,50 Usono: Futran, s-ro J., 36,—; Stephens, s-ro Donald, 27,—; Wesser, s-ro Alex, 5,90; Williams, s-ro R.G., 7,50.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (GLD.)

Aŭstrujo: Int. Esp.-Muzeo Wien, 139,13. Belgujo: Belga Esperanto-Federacio, 18,—; klubo "Verda Stelo", 17,99. Francujo: Klubo Esperantista St. Etienne, 7,50

Sumo entute ricevita:	25 039,05 gld.
Sumo elspezita:	25 851,54 gld.
Saldo negativa:	812,49 gld.

FONDAJO CANUTO

Germanujo: Schmidt, s-ro George, 1 MJ. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 1 MA.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

(Vidu "Esperanto", jul/aŭg, p. 136)

A. (16,— gld.): 23. Roy, s-ro H., Francujo; 24. † Pragano, s-ro S., Nederlando.

B. (5,— gld.): 6. Maillard, d-ro G.; 7. Perra, f-ino J., Francujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Nassif Isaac havas novan adreson: P.O.Box 1221, Cairo, Unuiĝinta Araba Respubliko.

30-jara fraŭlo, esperantisto, serĉas decajn samideaninojn por interkorespondado (celo geedziĝo). Skribu el tuta mondo. S. Nikolić, Trojstvo, Hrvatska, Jugoslavio.

Denaska esperantisto, dekjara, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun gesamaĝuloj. Alvaro Henrique Dias Pinto, caixa postal 834, Santo André, São Paulo, Brazilo.

Donu novjarajn donacojn de bonkvalitaj francaj kalendarlibretoj, ĉiu 5 f.f. du po 9 f.f. kvin po 20 f.f. Mendu tuj ĉe Eduardo Biggs, 1 rue Jean Moulin, 78 St. Cyr l'Ecole, Francujo.

"Renaskiĝo kaj kulturo" aranĝos letervesperon dum aprilo 1967. Oni respondos al ĉiuj. Adreso: "Renaskiĝo kaj kulturo", 24, rue des Meuniers, F-91-Epinay-sur-Orge, Francujo.

Denaska esperantistino dektrijara, gimnazianino, deziras korespondi pri studentaj temoj kun samaĝaj gestudentoj. Marisa Dias Pinto, caixa postal 834, Santo André, Sao Paulo, Brazilo.

Ĉu vi pripensis, ke KOKO-libro, pro sia luksa aspekto, sia altnivela enhavo, literature kiel ankaŭ ilustraĵe, estas ideala donaco. Petu senpagan prospekton ĉe Eldonejo KOKO, Jyllinge, Roskilde, Danlando.

Ĉu troviĝas iu racia bazo por la aserto, ke oni agu kun simpatio al aliaj, se oni mem deziras simpatian? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

"Esperanto kiel scienca kaj arta lingvo" estos temo de diskutvespero. Ni petas kontribuaĵojn. Skribu antaŭ la 15-a de februaro 1967 al Studenta Klubo, Skvadronsgränden 2, Lund, Svedujo. Kiel danko vi ricevos resumon de la diskuto.

Ekstereŭropanoj! Kuraĝigu niajn klubon kaj movadon, sendante ilustritan poŝtkarton en bele afrankita koverto (ekspoziciotaj). Ni respondos same. Adreso: La Ponto, Esperanto-Klubo, Heinola, Finnlando.

Por fama "Société Géographie Paris" ĝia "Esperanto-helpkerno" petegas dokumentojn. Gérard, 45, Rue Vouillé, Paris-XV.

Deziras interŝanĝi pmk. ĉ.l. Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, 75-Karlsruhe, Okc. Germanujo.

SER organizas letervesperon por la 25-a de januaro, 1967. Ĉiu sendinto ricevos ricevates-taĵon kaj eble trovos la serĉatan kanadan korespondanton. Amase sendu viajn leterojn kaj poŝtkartojn aerpoŝte al: Serbruka Esperanto-Rondo, S-ro Trefflé Mercier, App. 5, 554, rue Vimy, Sherbrooke, Québec, Canada (Kanado).

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Por sukcesi kaj feliĉadi jen via gvidilo: "Monoteismo kaj Pozitiva Moralo" de Emil Gasse. Mendu al UEA aŭ ceteraj Libroservoj. Gld. 4,20; st. 16,80 + 10%.

Irlanda Esperanto-Asocio, c/o "Woodbine", Bluebell, Dublin 12, aranĝos ekspozicion dum Februaro, 1967. Bonvole helpu nin per belaj bildkartoj, leteroj, broŝuroj, esp-aĵoj, k.t.p. Dankon.

Kiu idealistino dezirus esti asistantino kaj kamaradino al soleca nejuna sinjoro? D-ro Heinrichs, Kölnstr. 208, 53 Bonn, Germanujo.

Ĉiu gazeto dependas de iu: organizaĵo, partio, financa grupo aŭ unuopulo

esperanto

revuo internacia

estas la ĉefa oficiala organo de UEA kaj dependas de la tuta membraro kaj de la instancoj, kiujn la membraro libere elektas laŭ la Statuto ĉiun trian jaron.

TIAL, „ESPERANTO”

la plej internacia Esperanto-revuo en la mondo kun legantoj en pli ol 80 landoj,

SERVAS

la celojn de Universala Esperanto-Asocio kaj helpas al la plenumo de realecaj laborprogramoj, akceptitaj de la Komitato por plia progresigo de la Internacia Lingvo;

ESTAS REDAKTATA

internaciisme kaj respegulas la aspirojn de la multnacia membraro de UEA;

OBJEKTIVE INFORMAS

pri la malfacilaĵoj kaj pri la ĉefaj atingoj de la Internacia Lingvo en la mondo;

PUBLIKIGAS

altnivelajn artikolojn, analizajn studojn kaj recenzojn, verkitajn de internacia kunlaborantaro;

ENHAVAS

interesajn konstantajn rubrikojn: CED, Radio, Junularo, Mallongaj novaĵoj k.a.

La Revuo Esperanto

dependas de vi, esperantistoj ĉie en la mondo, ĝi estas via!

Tial, ĝis maksimumo varbu por ĝi abonantojn kaj membrojn-abonantojn tra la tuta movado. Donace abonigu tiujn, kiuj ne povas pagi mem. Donu tiun ĉi ekzempleron specimene al esperantisto, kiu ankoraŭ ne abonas ĝin, kaj petu de la Centra Oficejo alian ekzempleron, informante samtempe pri la nomo kaj adreso de la persono, al kiu vi donis ĝin. Se la koncernato poste abonos aŭ aliĝos, vi ricevos premion.

Abonprezo: 18,75 gld., 75 steloj jare. Ĉiu Membro-Abonanto de UEA (kotizo por 1967: 25 gld., 100 steloj) ricevas senpage la revuon Esperanto kaj la ampleksan jarlibron.

Kotizojn kaj abonojn akceptas la C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, aŭ la ĉefdelegitoj kaj perantoj de U.E.A.

KOLEKTU LA ELDONSERION

ORIENTO-OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplervagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REĜO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.


Krome, eksterordinara eldono en la serio:

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando



ELDONIS "LA BONA SEMISTO" - MONTEVIDEO-1965

JEN VERKO NECESA POR NIA KONFUZA MONDO

DULINGVA LIBRO (HISPANE KAJ
ESPERANTE) HONORE AL U. N. -
ORGANIZO EN LA JARO DE
INTERNACIA KUNLABORO

Enhavo universale valora: Intereseĝa — In-
strua — Eduka — Literatura — Agrabla —
Poezia kaj tre ilustrita

Unuĝintaj Nacioj — Homaj rajtoj — Zamen-
hof, Paca Apostolo — Esperanto kaj Unesko
— Esperanto-kulturo — Esperanto-lernolibro
(por Hispanlingvanoj) — Poezia antologio His-
pana kaj Hispanamerika — kaj aliaj diversaj
temoj tre interesaj

Bindita volumo (cm. 20 × 15) 376 paĝoj,
presitaj sur bona papero, kaj ilustrita per 130
fotogravuroj

BONEGA LIBRO POR DONACO

Prezo: U\$S 4.00 afrankite

Mendoj al UEA, al diversaj libroservoj aŭ
rekte al "LA BONA SEMISTO"

Casilla de Correo 863

MONTEVIDEO (Urugvajo)

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 47 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)


Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Japana ĝenro

UKIJOE

SIGELMARKOJ !!



Belaj
Multkoloraj
Majstraĵoj
Sur japana
papero, de

3,7 x 5,5 cm 10 bildoj

la famekonataj
Majstroj:
HOKUSAI
HIROŠIGE
UTAMARO k.t.p.

Prezoj

(kun afranko)

1 folio: 4 irk aŭ \$ 0,5

5 folioj kun 1 bildo 7,5 x 11 cm: 17 irk, \$ 2

10 folioj k. japana esp. 35 p. libro: 30 irk, \$ 3,75

Mendu !!

al ESPERO

P.O.Box 18, TURUMI, YOKOHAMA,
JAPANUJO

Jusa STAFETO-libro !

VOJAĜO INTER LA TEMPOJ GRAMATIKA STUDIO

de

K. KALOCSAY

Nia Budapeŝta Majstro sukcesis beligi nian lingvistikan panoramon per verko, kiu, rilate al la -ata/-ita afero, pleje pravigis la aserton de D-ro Zamenhof: "Lingvo estas **pure kondiĉa signado de ideoj**, kiu povas plenumi sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin **severe egale** - alie ĝi perdas sian sencon kaj celon, kaj servas ne al reciproka kompreniĝado, sed al malkompreniĝado" (O.V., 425)

Temas pri la plej trankvila, kvietaj, objektiva, scienca monografio pri tiu nur ŝajne malfacila temo -ata/-ita, monografio, kiu, por la unua fojo, enkorpiĝas la doktrinon de ĉiuj partioj en unu harmonian tuton, surbaze de nia lingva tradicio, baziĝinta sur la zamenhofa verkaro **Libro nepre havinda de ĉiu lingve interesata esperantisto !**

200 paĝoj en formato 16 x 22 cm.

Prezo: 2.40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Mendu tuj ĉe la Libroservo
de UEA

aŭ ĉe J. Régulo, Apartado 25, LA LAGUNA-
Tenerife — Kanariaj Insuloj

IVO LAPENNA ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

La Unua Parto konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

La Dua Parto enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

ĈIU leginto de RETORIKO, **ĈIU** persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 16 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

Proks. 150 pp., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.

Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA !

Anoj de Lions International, kiuj estas esperantistoj aŭ interesiĝas pri la Esperanto-movado, priskribu vian vidpunkton pri fondo de "Esperanto-Grupo de Leonoj" por interŝanĝi ideojn per leteroj aŭ seeble renkontiĝi en Universala Kongreso aŭ Internacia Kunveno de Leonoj. Ni deziras kontakti amikojn—"Leonojn". Skribu al s-ro Nils Gösta Narvala, Majavatie 14 A 7, Helsinki 80, aŭ John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, N.Y. 10314, Usono. Esperantistoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la Internacio de Leonoj bv. skribi por informoj.

La eldonejo:

EKUMENA ESPERANTO

prezentas al vi jenajn librojn:

La Vojoj de la Eklezio,

encikliko de papo Paŭlo VI — svisaj fr. 4.—

Sankta Meso,

liturgiaj tekstoj kaj kantoj — svisaj fr. 1.—

Ekumenaj Preĝoj

tradukitaj de Kurt Schweizer el la germanlingva libro de P. W. Scheele: Gebete der Oekumene, eldonita de Herder-Verlag Freiburg. — svisaj fr. 2.—

Mendu ĉe EKUMENA ESPERANTO,
Ch-9106 Zürchersmühle — Svislando